



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: EMILIO BRUQUETAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

MALNOVA KASTILJANO

(Daŭrigo)

—“Vi pentofaros, gesinjoroj, ekkriis la gastiganto jam sidinta; sed oni devas kompreni ke ni ne estas ĉe Genieys” parolo kiun li pensis necese diri. Stulta afekto estas tiu, se ĝi estas mensogo, mi diris al mi mem; kaj se veraĵo, granda malsagaĵo inviti amikojn por pentofari. Bedaŭrinde, mi ne prokrastis multe koni ke estis en tiu esprimo pli da vero ol mia bona Braŭlio pensis. Senfinaj kaj malbongustaj estis la komplimentoj per kiuj por doni kaj ricevi ĉiujn pladojn ni enuigis unu la alian. “Servu vin.—Bonvolu plezurigi min.—Neniel. — Mi ne ĝin ricevos.—Transdonu ĝin al la Sinjorino.—Ĝi estas bone tie.—Pardonu min.—Dankon.—Senceremonie, gesinjoroj, ekkriis Braŭlio, kaj li verŝis al si, la unua, per sia propra kule-ro. Sekvis la supo, “bojlaĵo” (1) provizita de ĉiuj bongustaj maloportunaĵoj de tiu enuiganta, kvankam bona mangajaĵo; krozas tie ĉi viando; tie, la legomoj; tie ĉi la hispanpizoj; tie la ŝinko; dekstre la kokinaĵo; meze la lardo; maldekstre la Extre-maduraj kolbasoj—Sekvis plado da lardita bovidaĵo, kiun Dio malbenu, kaj tiun ĉi alia, kaj aliaj kaj aliaj, duono da ili alportitaj de la gastejo, ke tiu sufiĉas por ke mi ŝparu ilian laŭdon, duono da ili pretigitaj hejme de la ĉiutaga servistino, de helpanta Biskajanino dungita eksprese por tiu festo kaj de la dommastrino, kiu en tiaj okazoj devas esti ĉie, kaj sekve ordinaro ŝi estas nenie.

“Tiu pladon oni devas senkulpigi, diris tiu ĉi pri kolombidoj; ili estas iomete bruligitaj.—Sed, edzino...—Homo mi apartiĝis momente, kaj vi ja scias kiel estas servistinoj—Kia domaĝo, ke tiu ĉi meleagro ne estis duonhoron plian ĉe la fajro! Oni metis ĝin tro malfrue. Ĉu vi ne kredas ke tiu stufaĵo estas iom fumigita?—Kion vi volas? Oni ne povas esti ĉie.—Ho, ĝi estas bonega, ni ĉiuj ekkriis ĝin preterlasante nur la teleroj! bonega!—Tiu ĉi fiŝo estas malfrue.—Sed en la ekspedejo de la fiŝpoŝto oni diris, ke ĝi ĵus estis alveninta; la servisto estas tiel bruta!—El kiu oni alportis

tiun vinon?—Pri tio vi ne pravus, ĉar...—Ĝi estas tre malbona”. Tiuj mallongaj elparoloj estis ornamataj per senfino da kaŝaj rigardoj de la edzo por averti senĉese lian edzinon pri ia malzorgo volante al ni komprenigi ambaŭ ke ili estis tre bone informataj pri ĉiuj formuloj, kiujn en tiaj okazoj oni konsideras ĝentilaĵoj kaj ke ĉiuj mallertajoj estis pro kaŭzo de la geservistoj, kiuj neniam lernas servi. Sed tiuj neglektoj ripetigis tiel ofte, utilis jam tiel malmulte la rigardoj, ke estis necese al la edzo alkuri al pincoj kaj al piedpremoj; kaj jam la Sinjorino, kiu malfacilege povis ĝis tiam elteni la persekuton de sia edzo estis ruĝvizaĝa kaj ekplorokula. “Sinjorino, ne ĝenu pro tio, al ŝi diris ŝia apudestanto.—Ho!, mi certigas vin, ke mi ne faros ree tiajn aferojn hejme; vi ne scias kio estas tio; alian fojon, Braŭlio, ni iros al la gastejo kaj vi ne havos...—Vi, mia Sinjorino, vi faros tion kion...—Braŭlio, Braŭlio!”. Timeginda ventego estis eksplodonta; tamen, ĉiuj gastoj konkure provis pacigi tiujn bataletojn, naskitaj el la deziro komprenigi plej grandan delikatecon, pro kio ne estis eta parto la manio de Braŭlio kaj la konkludanta esprimo kiun li adreŝis denove al la ĉeestantaro pri la senutilo de la komplimentoj, ĉar li nomas tiel esti bone servata kaj scii manĝi. Ĉu estas io pli ridinda ol tiuj homoj volantaj ŝajni ĝentilaj meze de plej dika nescio pri sociaj kutimoj? Kiuj por vin regali, devigas vin perforte manĝi kaj trinki kaj ne lasas al vi rimedon fari vian deziron? Kial estas homoj, kiu nur volas manĝi per iom da pureco la nomtagojn?

Dum tio ĉi, la infano ĉeestanta maldekstre de mi saltigis la olivojn al plado de ŝinko kun tomat-sauco, kaj unu venis halti al okulo mia, kiu ne povis klare revidi dum la tuta tago; kaj la dika sinjoro mia dekstre havis la antaŭzorgon lasi sur la tablotuko, apud mia pano, la kernojn de la siaj kaj la ostojn de la birdoj, kiujn li mordetadis; la kontraŭsidanta gasto, kiun sin laŭdis kiel tranĉisto prenis sur sin fari la autopsion de ĉapono, aŭ koko, ĉar tion neniam oni sciis; ĉu estu pro la granda aĝo de la viktimo, ĉu pro la neniam anatomiaj kon-
oj de la viktimitiganto, neniam aperis la artikoj.

(1) Hispana tipa mangajaĵo.—(Noto de la Trad.)

“Tiu ĉapono ne havas artikojn” ekkriadis la malfeliĉulo ŝvitanta kaj peniganta, plie kvazaŭ kiu fosas ol kvazaŭ kiu tranĉas. Pli stranga afero! Dum unu el la atakoj la forko glitis sur la besto, kvazaŭ ĝi havus skvamojn, kaj la ĉapono perforite forpŝita, ŝajnis ekflugi kiel dum siaj plej feliĉaj tempoj, kaj haltis sur la tablotuko trankvile, kiel ĝi povus sur stango de birdkorto.

La ektimo estis ĝenerala, kaj la alarmo atingis sian supron. Kiam buljona ŝpruco, pelata de la furioza besto, eliris superakvigi mian puregan ĉemizon: levas sin, tiatempe, la tranĉanto kun la celo ĉasi la forkurintan birdon, kaj rapidante sur ĝin, botelo staranta dekstre, kontraŭ kiu li brakpuŝas, forlasante sian perpendikularan pozicion ŝprucas abondan fluon de Valdepeñas-vino sur la ĉaponon kaj la tablotukon; fluas la vino, pligrandiĝas la bruego, pluvas la salo sur la vinon por savi la tablotukon; por savi la tablon oni intermetas sub la tuko buŝtukon, kaj altaĵo leviga sur la teatro de tiom da ruinoj. Servistino, tute konsternata, forportas la ĉaponon en la plado de ĝia saŭco; min preterpasante ŝi faras gracian kliniĝon kaj malbonfaranta graso pluvo falas, kiel roso sur herbejojn, lasi eternajn postsignojn en mia perlkolora pantalone; korpreno kaj konfuzo de la servistino ne konas finon; ŝi ekeliras konsternite sen trafi senkulpigojn, sin turnante ŝi puŝas kontraŭ la servisto kiu alportas dekduon da puraj teleroj kaj pleton kun glasetoj por la dolĉaj vinoj, kaj tiu ilaro venas planken kun la plej terura bruego kaj konsterno. “Pro Sankta Petro!” krias eligante fortan voĉon Sinjoro Braŭlio; disvastigita jam sur siaj trajtoj morta paleco, dume ŝprucas fajro el la vizaĝo de lia edzino. “Sed ni daŭrigu, gesinjoroj, tio estas nenio” li aldonas rekonsciante.

Ho honestaj hejmoj, kie modesta bolajo kaj fina komenĉplado faras la ĉiutagan feliĉon de familio, forkuru el la tumulto de nomfesta gastigo! Nur ia kutimo ĉiutage bone manĝi kaj servigi povas eviti tiajn domaĝojn!

Ĉu estas pli da malfeliĉaĵoj? Sankta ĉielo! Jes, tiaj estas por mi, malfeliĉulo! Sinjorino Johanino, la nigr-kaj flava dentulino, etendas al mi el sia telero kaj per sia propra forko frandaĵon, kiun nepre oni devas akcepti kaj engluti; la infano sin amuzas ĵeti al la okuloj de la ĉeestantoj la pafitajn kernojn de la ĉerizoj; Sro Leandro igas al mi gustumi la bonegan “Manzanilla” kiun mi rifuzis, en sia propra glaseto, kiu konservas la nemalaperigeblajn postsignojn de liaj grashavaj lipoj; mia dikulo fumus jam senĉese kaj igas min tubo de sia kameno; fine, ho lasta de la malfeliĉaĵoj! grandiga la bruo kaj la bablado, la voĉoj jam rakaj postulas versojn kaj “dekojn”, kaj ne estas plia poeto ol Figaro. “Estas necese-vi devas iom diri, petas ĉiuj-Donu al li devigan rimon; ke li diru strofon po ĉiu.—Mi donos la rimon: *Al Sro Braŭdio ĉi tiun tagon.*—Sinjoroj, pro Dio!—Ne estas rimedo.—Mi neniam improvizis.—Ne ŝajniĝu malgrandulo.—Mi foriros. — Fermu la pordon.— Oni ne eliras el tie sen ke oni diru iom”. Kaj fine mi diras versaĵojn kaj vomas stultajojn, kaj oni laŭdas ilin, kaj pliiĝas la bruo, kaj la fumo, kaj la infero.

Dank'al Dio mi trafas forkuri el tiu nova Tutdemono. Kaj fine, mi respiras la stratan liberan kaj neembarasitan aeron; jam ne estas plu stultuloj, jam ne estas malnovaj kastiljanoj ĉirkaŭ mi. Sankta Dio, mi dankas vin, mi ekkrias respi-

rante, kiel la cervo kiu ĵus forkuris el dekduo da hundoj, kaj kiu apenaŭ aŭdas ilian bojadon; por la estonto mi ne petas de vi riĉaĵojn, mi ne petas de vi oficojn, mi ne petas de vi honorigojn; liberigu min el la hejmecaj gastigoj kaj el la nomfestaj tagoj, liberigu min el tiuj hejmoj en kiu gastigo estas neoftaĵo, en kiuj nur oni pretigas konvenan tablon por la gastoj, en kiuj oni pensas fari agrablajojn kiam oni donas turmentojn, en kiuj oni faras ĝentilajojn, en kiuj oni deklamas versojn, en kiuj estas infanoj, en kiuj estas dikuloj, en kiuj, fine, regas la bruta senkaŝemo de la malnovaj kastiljanoj! Mi volas, ke se denove mi falas en tiaj tentoj, manku al mi “roastbeef”, malaperu el la mondo la “beefsteak”, neniigu la cimbaloj de makaronoj, ne estu meleagroj en Perigneux, nek kukoj en Perigordo, sekigu la vinberaroj en Bordeaux kaj trinku, fine, ĉiuj krom mi, la ravan ŝaŭmon de la Campanvino.

FÍGARO.

(Mariano de Larra «Fígaro», fama verkisto hispana 1809 1837).

Tradukis,
AMALIA NÚÑEZ.

Pamplona.

POR “FRATECO” ZARAGOZO

LA MALESPERANTO

Dum la forpasado de l' tempo, plaĉa al iuj homoj kaj malplaĉa al aliaj, scie aŭ nescie, ĉiuj supreniradas, ŝtupon post ŝtupo, sian ĉu glatan ĉu malglatan vivŝtuparon.

Desur la supro, la altenlevigantoj haltas momenton kaj forjetas alrigardon super vastan la subpiedan panoramon.

Ĉiuj povas kalkuli supreniritajn ŝtupojn; neniuj elkakulas la supreniritajn.

Ĉiuj estas lacaj. Ĉiuj—unuj kaj aliaj—frostotremas antaŭ kaŝita la estonto. Ili volonte ripozus ĝiseterne. Sur ĉies vizaĝo kaj ĉies animo speguliĝas la senespero...

Tamen antaŭen, ĉiam antaŭen. Oni nur haltu dum momento, nur unuminutan evokon pri l'pasinto, kelksekundan mediton nur pri l'nebulosa estonto, kaj tuj antaŭen, ho jes, antaŭen!

La espero, neniam forlasante la homojn, beligas al ili la novan vojiron. Unuj ankoraŭ kredas, esperas. Aliaj jam pridubas, malesperas... Ĝi estas tiel mallongdaŭra kompare kun la jarmilpasado de l' Historio.

Niaj unuopaj vivoj konsumiĝas samkiel kandel-flamo; dum la Historio daŭrigas sian senfinan travivadon... Oni mortas nur unuope... la Homaro eterne antaŭeniras. Tamen la Homaro konsistas el Homoj—samkiel Ĉeno el Ĉeneroj...

Ĉu amara sino...?

Ni volas kaj devas kredi, ke iu estas kunligitaj same al estanta kiel al estinta kiel al estonta Homaro. De l' estanta ni ricevas la vivon. De l' pasinta ĉion: ideojn, sentojn... De l' venonta la esperon pri feliĉa morgaŭo...

Suprenirante ankoraŭfoje novan vivŝtupon, ni kredas, esperas. Vi ankaŭ.

Sed, mia najbaro, la malesperanto...?

RICARDO QUILES.

Valencia, 23, VI, 33.

PRI LA SOCIETO-KREEMO

Al sinjoro Orós, mia gramatika instruinto kaj fervora esperantisto.

Sajnas paradokso, tamen, la plej veregaj veroj estas, iafoje, la paradoksoj. Sajnas paradokso ke la esperantistoj, amante la homan pacon, la homan kunigon, ne sin amu reciproke laŭ ia vidpunkto; laŭ la kluba vidpunkto. Ĉar funde la interesperantistoj ĉe la lingva celo ĉiu sentas simpatian por ĉiuj. Male, tiu esperantisto eraris la elekton de sia emeca vojo; liaj konoj devus esti militemaj, politikulaj aŭ boksistaj, sed ne esperantaj.

Konante, do, sur kia flanko de l'Esperanto la esperantistoj sin disigas, ni iru en la aferon:

Oni aŭdas diri tutplende al fervoraj esperantistoj: "Sendube, Esperanto kreskas ĉe nia urbo, tamen ĝi ne bone travivas, ne bone oni ĝin propagandas; ĝi, anstataŭ esti homa ligilo, sajnas disigilo homa. Ni, la esperantistoj, ne scias kalkuli ĝis kie iras nia malbona ago krei novajn klubojn esperantaj kiam ankoraŭ ne estas sufiĉe fortikaj la ekzistantaj nune; ni estas relative icmete nombraj, sed la dividiĝo nuligas nin; imagu vi kiel forta societo estus se nur unu ekzistus en nia urbo, societo sentendenca, societo senpartia; societo *esperantista* nur!... Same estas dirinde pri la naciaj asocioj kaj eĉ pri la mondaj. Kion ni atingas estante multenombro da asocioj kiuj celas la samon, tio estas; disvastigi Esperanton? Facila kvankam malagrabra respondo: "Ne atingi vere fortan asocion esperantan". Kaj tio ĉi okazas pro la senpardoninda forgeso de multaj esperantistoj ke ili, kiel esperantistoj, estas *nur* esperantistoj, aŭ ili ne rimarkis ke sur la supra angulo de l'flago esperantista troviĝas la verda stelo ĉe blanka kvadrato dirante per la forta voĉo de l'simbolo: "Esperanto ne estas ruĝa, nek nigra, nek flava; Esperanto estas blanka kiel ĉiu neŭtralaĵo, Esperanto apartenas al Homaro kaj la Homaro ne havas partiecon; la homoj estas partiemaj sed la Homaro estas *senpartia*. Kaj Esperanto estas la plej valora propraĵo kreita por la Homaro".

Tion ĉi, pli longe dirite, oni aŭdas al fervoraj esperantistoj. Tion ĉi ili diras kaj eble pravas. Sed, tamen, mi opinias kontraŭe:

Mi opinias ke Esperanto estas rikolto de l' estonto kiun nune oni semas. La semo en la sako, t. e. tute kunigita, ne ekkreskas; pli bone se ĝi falis izole en la sulkoj. Se mia peno kaj sonĝo estas granda arbaro, espero de mia arbaro estas multenombraj senfortaj arboj kaj ne sola, forta, grandega arbo. Se mia esperanta revo estas ke Esperanto estu parolata de ĉiuj personoj, tre plaĉe mi vidas multajn nefortajn klubojn... ĉar ĉiuj ili havas deziron fortiĝi, kiel ĉiuj junaj arboj, sub la suno de l' entuziasmo. Multaj riveretoj apenaŭ havantaj akvon faras tre fruktodona la kamparon dum riverego pasas tra la dezerto apenaŭ florigante ĝian bordojn...

Mi povus adicii pli da argumentoj por pravigi mian vidpunkton pri tiu ĉi interesa afero, sed spaco malpermesas; tamen, vi, bonkora leganto kaj entuziasma esperantisto, ĝojus kiam nova esperanta klubo naskiĝas en nia urbo, ĉar nova semanto aperis. Ĝi ne naskiĝas por kanonpafi vian socion aŭ grupon, sed por helpi vian varban laboron.

Se iu el la kreantoj de l' nova klubo parolas perfide pri la malnovaj societoj, kompatu lin; ĉar

lia kapo ja lernis Esperanton dum lia koro ankoraŭ ĝin malkonas. Ĉar tiu esperantisto kies koro ignoras la dolĉan senton de l'Amo kaj Paco—vera kaj ĉefa enhavo de Esperanto—estas vere kompatinda, gesamideanoj, vere kompatinda...

AVELINO SEVILLA.

TRAGEDIA AMHISTORIO

Flej kore dediĉata al la patro de la esperantistoj Sro. E. Artigas.

I

Belega mateno dum la monato Majo. Nia patro suno disdonas la varmon de ĝiaj radioj sur la kamparon kaj la birdoj kantas gaje belegajn kantojn al patrino Naturo.

Iu birdeto forlasas la varman neston (ĝian hejmon), serĉas manĝaĵetojn inter la kampara herbaro kaj portante ilin en ĝia beketo revenas en la neston, kie la birdino kaj iliaj idoj ame ĝin ĉirkaŭas blekante.

Kiel feliĉa familio!

Sub la nestoharvantaj arboj du homaj estajoj admiras la belegan pejzaĝon revante posedi hejmon kvazaŭ birda nesto. Tiuj ĉi homaj estajoj estas tre junaj, li estas dudekjaraĝa kaj ŝi estas dekokjara, ili estas tre feliĉaj tial ke scias kompreni kie oni trovas la veron, ili eksterordinare ĝuas admirante la naturan pejzaĝon kaj iliaj langoj ne parolas sed parolas iliaj koroj pri amo.

Ili ne diris al iliaj konatuloj ke estas gefianĉoj, neniu ĝi scias, ili nur scias ke ili amas reciproke unu la alian, ili ne scias ĉu sentas fianĉan, fratan aŭ amikan amon, nur estas vero ke ili sentas puran kaj veran amon.

Sed, ho ve!

Militbatalo komencis ĉagrenigi la popolojn kaj la junaj viroj devis iri en batalkampojn por mortigi aŭ por esti mortigataj, kaj inter ili devis iri Antonio.

Mario estis tute ĉagrenita kaj ploris multe, Antonio ne ploris ĉar li ne volis pli ĉagrenigi Marion sed lia koro estis terure dolorigita.

Antonio foriris post malmultaj tagoj, Mario kun la okuloj ŝvelintaj pro plorado iris por atendi la leterportiston.

Feliĉe, Mario ricevis leteron de ŝia amato sed tiu letero estis la unua kaj la lasta kiun ŝi ricevis, ĉar poste jam oni sciis neniom en la vilaĝo pri Antonio.

Pasis la tempo, kaj la maljunaj gepatroj de Antonio mortis pro ĉagreno tial ke ili sciis neniom pri la filo.

Mario, estis orfa de ŝiaj infanaj jaroj kaj ŝi kreskis sub la subteno de la gepatroj de Antonio, nun ŝi restas tute sola en la mondo kaj kun la koro kvazaŭ sangumante vundita pro daŭra suferado.

Ŝi iris ĉiutage en la kamparon kaj sub la nestoharvantaj arboj, kie ŝi apud Antonio revis feliĉe, nun malgaje rememoras tiujn gajajn tempojn.

Nun, ankaŭ la patro suno disdonas varmon per ĝiaj radioj, ankaŭ patrino Naturo disdonas ĝiajn tutajn ĉarmaĵojn sed la birdoj malgaje kantas:

"En la najbara nesto mankas la fameliestro..."

Mario neniel povis forgesi Antonon, neniam dubis ŝi pri lia amo kaj plie ŝi havis esperon revidi

lin, ĉiam ŝiaj okuloj rigardis malproksimen kvazaŭ ŝi estus vidonta Antonon veninta tra la vilaĝa vojo.

II

Jam pasis dekdu jaroj Mario ĉiam esperante revidi Antonon fariĝis flegistino ĉe la vilaĝa malsanulejo, tie ŝi helpis la kurasciston pri la plej malfacilaj laboroj ĉe malsanaj korpoj kaj ŝi fermis la okulojn de ĉiuj kiuj mortis sen familio apud ŝi.

Tial ke ŝi treege suferis, en sia nigra hararo oni komencas vidi la unuajn blankajn harojn, ŝiaj okuloj rigardas tre malgaje sed malgraŭ tio ankoraŭ ŝi estas bela kaj ŝia dolĉa rigardo agas kvazaŭ konsolo kaj resanigo en tiuj malsanaj korpoj kiuj alvenis al la malsanulejo.

Ian tagon, estis dimanĉo, Mario forlasis ŝiajn malsanulojn kaj iris por pasigi la tagon en la kamparo sub la samaj nestohavantaj arboj kie antaŭtempe ŝi ĝuis feliĉon apud Antono.

Tiun ĉi tagon pli forte kaj arde ol neniam ŝi sentis la esperon kaj kredon ke Antono baldaŭ revenos, tial dum la tuta tago ŝi revis kaj ĉe ŝajnis al ŝi ke la birdoj anstataŭ kanti elparolis la nomon de ŝia amato.

III

Kiam Mario alvenis al la malsanulejo jam noktigis, ŝi kiel ĉiam demandis al la pordisto:

—Ĉu oni ricevis por mi leteron?

—Ne, fraŭlino Mario, respondis la pordisto, sed la s-ro kuracisto diris al mi ke tuj kiam vi venos mi diru al vi ke vi eniru ĉe la lastan ĉambron, ĉar iu malsanulo kiu venis hodiaŭ eble bezonos ke vi fermu liajn okulojn.

—Mi iras rapide, diris Mario, kaj iris en la ĉambron de la nova malsana gasto.

(daŭrigota)

PILAR SALVO.

Ni havas malbonan kutimon

Jes karaj gesamlingvanoj, ni la plimulto el la zaragoza esperantanaro (ni ne scias ĉu de Zaragoza okazas same kiel ĉi tie), kvankam jam de longe ni estas lernintaj Esperanton, se ne perfekte, sufiĉe por konversacii logike kaj klare, ni ne konversacias. Ni iras en la klubon aŭ trovas ĉe iu loko esperantan konatulon kaj korektege eĉ elegantmaniere kaj rapide ni salutas unu la alian, poste ni interparolas ankaŭ esperante sed malrapide, serĉante la vortojn, ĝenerale pri bagateloj; multajn fojojn ni nur uzas Esperanton por la saluto, konversaciante en nia nacia lingvo sed, je la adiaŭo ni denove perfekte sed rutine eligas de nia ridetanta buŝo la sciitajn vortojn eĉ de la ne esperantanoj: "fartu bone" kaj ni daŭrigas ridetante kvazaŭ ni estus farintaj gravegan laboron por Esperanto.

Ankoraŭ plu: Por la interrilatoj de la esperantaj kluboj mi kredas ke la ilo devas esti ankaŭ esperanta, ke ĉe esperantanoj uzi Esperanto estas devo; sed ofte ne okazas tiel, ĉar mi vidis oficialajn skribojn senditajn de klubo al alia nacilingve redaktitajn; ankaŭ mi vidis la bultenon "Esperanta Progreso" presita tute hispane, kiu igis min pensi ĉu per Esperanto ne estas eble interkomprenigi bone... Pensu pri tio gekamaradoj, pensu ke Esperanto utilas certe por esprimi ĉiujn pensojn,

por fratigi kun la tutmondaj homoj, pensu ke ĉi tie vi ne bezonas Esperanton sed for el via lando, ĉe esperantanoj, vi nepre bezonos esprimi per Esperanto la tutan konversacion, ne nur la saluton.

KVARTALOJ.

KRISTNASKA LOTERIO

Numero 18.243

Ni disvendas loterion; oni ĝin povas aĉeti al S-ro Larruga, Strato Convertidos, 9, presejo, dum la tuta tago kaj ankaŭ en nia klubo, de la oka kaj duono ĝis la naŭa vespere; ni sciigas ke ĝi estos aĉetebla ĝis la 8^a de Decembro.

SCIIGOJ

En le ejo de la Komercista Asocio el Cartagena, Sro Jozefo Lerroux malfermis esperantan kurson al kiu aliĝis 24 lernantoj. Ni ĝoje vidas tiun esperantan laboron de nia amiko Sro Lerroux kaj instigas lin daŭrigu senĉese tiun laboradon.

La tre laborena samideano Sro Manuel Rodellar daŭrigas sian konstantan esperantan propagandon. Sur la semajna gazeto "El Clamor" de Badalona, Sro Rodellar publikigas klarigantajn lecionojn pri Esperanto. Grava kaj imitinda agado!

Per radio-stacio Kataluna divastigas nian ideon la Prezidanto de Kataluna Esp. Federacio Sro Alberich. La paroladojn, kiuj okazas ĉiujn du lundojn je la 20,15 h. atingas grandan sukceson.

La estro de nia "Rondo de Naciaj Instruistoj" Sro Vicente Perles estis destinita al Callosa de Ensarriá (Alicante) kie kun nia amiko Sro Domenech faras intensan esp. laboron.

Ankaŭ nia tre entuziasma samideano Sro Jozefo Domeque estis destinita al la publika lernejo de Gelsa (Zaragoza).

Pri la eksterordinara numero de NIA VIVO

Ni ricevis, ĉies, multenombrajn gratulojn pro la aperigo de la eksterordinara numero de NIA VIVO. Tial ke ni ne povas respondi ĉiun leteron el la ricevitaĵoj, ni dankegas al ĉiuj, pere de tiu ĉi, tiujn gratulojn ĉefe de Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado; *Heraldo de Aragón*; Sroj Inglada, F. Redondo, Soler y Valls, ktp, ktp.

Malgraŭ la granda eldono de tiu ĉi numero, ĝi jam estas preskaŭ elĉerpita; ni disvendas specimenon po 40 centj en Hispanlando kaj po 1 respondkupono por eksterlando.

GRAVA AVIZO

Ĉe Frateco, Stro. Roda 14-16, oni malfermos senpagan kurson por lernado de "Trancarto kaj Konfekcio".

Povos aliĝi ĉiuj fratecaninoj.

La kurso estos gvidata de F-ino V. Bueno, mastrino de l' Akademio "La Pariza Trancarto", Roda, 36, 2.^a

La kurso komenciĝos la 3^{an} de Novembro.